

BELGA ESPERANTO-FEDERACIO



# Sonorilo

59a jaro n° 2  
marto - aprilo 1967

# Sonorilo


dumonata bulteno de B.E.F.

**REDAKCIO:** JAUMOTTE MAURICE  
ROOSE FERNAND, SINT-KLARAADREEF 59, BRUGGE TEL. (050) 319.81  
MAERTENS GRÉGOIRE  
POUPEYE CHARLES

**KUNLABORANTOJ AL REGULAJ RUBRIKOJ:**

DR. POL DENOËL      DURWAEL IVO      ISERENTANT ROGER

**ADMINISTRADO:** TERRYN J. RAAPSTRAAT 72 GENT



**ASOCIO SEN PROFITA CELO**

**SIDEJO & PREZIDANTEJO**

DEBRUYNLAAN 44, WILRIJK TEL. (03) 377758

**HONORA PREZIDANTO**

KEMPENEERS PAUL

**HONORA VICPREZIDANTO**

SIELENS HENRI

**ĜENERALA PREZIDANTO**

JAUMOTTE MAURICE

**PREZIDANTOJ**

DEBROUWERE GERARD, MAGDALENASTRAAT 29 KORERIJK  
DRO DENOËL POL, 20 RUE V. RASKIN LIÈGE

**UNUA VICPREZIDANTO**

ROOSE FERNAND

**VICPREZIDANTO FAKESTRO PRI TEĤNIKAJ RIMEDOJ**

VERSTRAETEN JULES, SINT BERNARDSE STEENWEG 1078 HOBOKEN

**ĜENERALA SEKRETARIO**

DE ROOVER R., LUCHTVAARTSTRAAT 28 BORGERHOUT TEL. (03) 3942 94

**SEKRETARIO POR LA NEDERLANDLINGVA REGIONO**

MAERTENS GRÉGOIRE, PRINS LEOPOLDSTR 51, ST-KRUIS TEL. (050) 34935

**SEKRETARIO POR LA FRANCLINGVA REGIONO**

PAULUS RAYMOND, 73, RUE DE MONTIGNIES, CHARLEROI

**KASISTINO**

TERRYN JULIETTE, RAAPSTRAAT 72, GENT

**POŝTKONTO DE B.E.F.:** 1634 34 RAAPSTRAAT 72, GENT

**ĈEFDELEGITO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO**

FR. SCHELLEKENS, FRANS HENSSTRAAT, 44, ANTWERPEN 2  
P.K. 9051 25



K  
A  
R  
L  
O  
R  
E  
G  
O

Cirkaŭ 1650, ĉe la kunfluo de Sambre kaj Pieton, kuŝis vilaĝeto konsistanta el kvindeko da domoj ĉirkaŭantaj kamparan preĝejon; dokumento en la Abatejo de Lobbes rimarkigas ĝin jam

en 868 per la nomo Karnoit aŭ Charnoy (loko plantita de karpenoj).

Sidantaj sur la supro de natura teramaso, ĝiaj tri grupoj de domoj superstaris paŝtejojn kiujn la Sambre trafluis. En 1666, la markizo de Castel-Rodrigo, Guberniestro de la hispanaj Nederlando, rimarkis tiun mirindan strategian situon, kaj reprenante projekton jam pensitan dum la regno de Karlo la Kvina, decidis starigi tie citadelon kiu fariĝis parto de fortika linio etendiĝanta laŭ la Sambre, nura rivero povanta haltigi francan invadon. Dum la printempo en 1666, la fortikaĵo de la markizo estis ekkonstruata kaj en septembro, la Guberniestro alnomis la novan fortikan lokon per la nomo de la regnanta suvereno: Karlo la Dua, kaj la vilaĝo de Charnoy fariĝis la urbo de Charleroy. En 1667, la remparoj estante apenaŭ starigitaj, la soldatoj de Ludoviko la Dekkvara (Louis XIV) ekokupas perforte Charleroy, la Hispanoj forkuras kaj Vauban finfinas la fortikaĵojn.

La traktato de Aĥeno en 1668 donas Charleroy al Francujo. Konsilista de Louvois, Louis XIV konsentas multnombrajn privilegiojn al la

novaj urbanoj, konstruigas ponton super la Sambre kaj estigas foire-  
jojn kaj vendejojn je regulaj datoj.

Ĉirkaŭ la fino de lia regno, en Karloreĝo estis starigitaj vitrofand-  
ejo, bierfarejo, kelkaj uzinetoj prilaborantaj la feron, kaj kelkaj ven-  
tomuelejoj.

En 1673, Louvois fondis alian kvartalon esence komercan, kiu  
estis vivtenonta la garnizonon: la Malalta Urbo. Karloreĝo tiuepoke  
entenis 1350 loĝantojn en 368 domoj.

Tiam alvenis « La Malfeliĉa Jarcento »...

En 1677, Guillaume d'Orange, Guberniestro de Holando, atakas  
Charleroy kaj estas forpelita de la Francoj.

1678: La traktato de Nimègo cedas nian urbon al Hispanujo.

1698: Post 27-taga sieĝo, ĝi estas rekaptita de la Francoj.

1701: Charles II mortis — Batalo de la « Heredado de Hispanujo ».

La urbo estas redonita al la Hispanoj, kaj refoje rekaptita de la  
Francoj. Ĝi estas poste okupita de la Holandanoj, kaj cedita al Aŭstrujo  
(1714) sed rekaptita en 1745 de Princo de Conti.

La traktato de Aachen en 1748 redonas ĝin al Aŭstrujo. Fine, dum  
45 jaroj, la urbo travivas pacon kaj rilativan prosperon per la laboro  
kaj la industria progreso.

En 1793 rekomenciĝas la movado inter venkintoj kaj venkikoj,  
inter Aŭstroj kaj Francoj. La Franca venko de Fleurus en 1794 finas la  
historion de la « Antikva Charleroy ». Poste, de 1794 ĝis 1800, Charleroy  
nomiĝos « Char sur Sambre », « Charles sur Sambre », « Libre sur  
Sambre ».

Pro Napoleon, multnombraj Valonoj mortis sur la batalkampoj de  
Marengo - Aŭsterlitz - Wagram - Moskou - Leipzig.

Post la deportado sur la insulo Elbe, niaj prauloj aplaudas la reve-  
non de la « Aglo » kaj la 15-an de junio 1815-a, Napoleon trapasas  
Charleroi kaj ripozas en domo portanta la nomon « Belle-Vue » en la  
aktuala Strato Nova (tiuepoke: Strato de Bruselo).

Dum 1816a, stariĝas la pordo de Waterloo. La Universitato de la  
Laboro estas konstruita sur la remparoj de la fortikaĵo, proksime al la  
Placo de Broucheterre, kie staris bastiono de « Brousseterre ».

La aktualaj bulvaroj estas konstruitaj sur la malnovaj remparoj.  
Ekzistas ankoraŭ, en la strato de Dampremy, ŝtuparo, inter la forti-  
kaĵoj kaj la Malalta Urbo.

La Placo de la Malalta Urbo, aŭ Placo Albert 1er, nomiĝis « verda  
placo ». Ĝi estis vasta herbejo ĉirkaŭita de dikaj tilioj, formanta agra-  
blan promenojon.

Ĉirkaŭ 1780 oni malkonstruis la unuan preĝejeton de Charnoy kaj  
anstataŭis ĝin per renesanca preĝejo Santa Kristoforo. Tiu-ĉi antaŭ  
kelkaj jaroj estis preskaŭ tute renovigita; ĝi estas nun belega kaj tre  
moderna baziliko kie okazos esperanta meso dum nia kongreso.

La kanalo de Charleroi ĝis Bruselo estis inaŭgurita de Guillaume  
d'Orange dum 1823-a.

Karloreĝo — kiu nur nombras ĉirkaŭ 30.000 enloĝantojn — estas  
la koro de impona industria regiono (300.000 enloĝantoj).

# 49-a Kongreso de B.E.F.

6-a Kongreso de B. E. J. A.

PENTEKOSTO

KARLOREĜO

13/15.5.1967

60-a datreveno de la grupfondo

ADRESO POR KORESPONDADO  
K. G. E. 73, rue de Montigny, Charleroi

## Honora Komitato :

S-ro CORNEZ	Provincestro
S-ro ABRASSART	Distrikta Komisaro
S-ro HUBAUX	Deputito — Urbestro de Karloreĝo

## Loka Kongresa Komitato :

F-ino ORSOLINI Andrée	Prezidantino
S-ro DEVILLEZ Marcel	Vic-prezidanto (Eksteraj rilatoj)
S-ro DESTABELLE Roger	Sekretario
S-ro PAULUS Raymond	Kasisto — Kontisto / Traduka servo
S-ino GUILBERT Lucy	Loĝiga servo

**KONGRESEJO** Bâtiment administratif de l'Université du Travail :  
Boulevard Roullier

## PROGRAMO

### Sabato 13-a de Majo :

14 h.	Malfermo de la Kongresejo (Universitato de la Laboro). Malfermo de la Poŝtoŝeĉejo kaj Ekspozicio de Esp.poŝtmarkoj (en la Honor-Halo de la Universitato). Ripozo kaj babilado	Salono Issbrücker (AC. 3)
15 h.	Kunsido de la Administrantaro de BEF	Salono Baghy (AC. 4)
16 h.	Vizito de Nacia Instituto de la Vitraĵo	Bulv. Defontaine (Plaine des Manœuvres)
19 h.	Akcepto de Oficialuloj	Preleg-saloneto
19 h. 30	Distra Vespero okaze de la 60-a datreveno de la Karloreĝa Grupo	Salono Zamenhof (Auditorium)

## DIMANĈO 14-a de Majo

- 9 h. Esperanta Meso kaj prediko celebrata de Sinjoro Abato SAEN el Antverpeno      Baziliko Santa Kristoforo (Placo Karlo IIa)
- 10 h. Ĝenerala kunsido de B.E.F.      Universitato :  
Salono Zamenhof
- 11 h. 30 Akcepto de la Kongresanoj, fare de la Urba Administrantaro      Urbdomo de Charleroi (Placo Karlo II-a)
- 12 h. Vizito de la Urba Muzeo de pentraĵoj  
Klarigoj de la Muzeestro S-ro F. André      Urbdomo
- 13 h. Fotografado de la Kongresanoj sur la perono de la Urbdomo Poste libervola tagmanĝo komuna
- 15 h. 30 Foriro per aŭtoĉaro al Distra Loverval :  
Vizito de la Centro de Marcinelle  
Vizito de estonta Junuldomo de tiu centro, gvidata de la arkitekto J. Depelsenaire, (Roma premiita)  
Promenado — remado —  
Kunveno de B.E.J.A. membroj
- 17 h. 30 Foriro per aŭtoĉaro al Charleroi
- 19 h. Kunsido de I.K.U.E. membroj      Hotelo "Caves d'Artois" (1-a etaĝo)
- 19 h. 30 Bankedo      Hotelo "Caves d'Artois" (1-a etaĝo)  
Balo      Placo E. Buisset  
Tombolo

## LUNDO 15-a de Majo

- Je la 10-a h., foriro de la aŭtoĉaroj Suda stacidomo  
Laŭ la rivero « Sambre » kie staras parto de la loka industrio (Chatelet, Montignies), ni atingas Bouffioulx, iam fama loko pro ĝiaj potfarejoj, poste Acoz kaj ĝia kastelo Pirmez.
- Cirkaŭ 11 h. 30 oni rigardos la Procesion Sta Rolandino kiam ĝi trairas la vilaĝon Villers-Poteries.  
Favora okazo por la amatoroj de brilkoloraj fotoj.  
Vizito al la romanika preĝejo de Gerpinnes.
- 12 h. Tagmanĝo en la belega Kastelo de Ham-sur-Heure.
- 14 h. Vizito de la feŭda Kastelo de Thy-le-Château.  
Realveno en Karloreĝo kaj adiaŭoj.

## NOVAJ ENSKRIBOJ

### POR CHARLEROI

- 67 — S-ino Rennoir Gilberte - 100, rue du Roton, Charleroi  
68 — S-ino Bailly-Allard Ad. - 69, rue de Montigny, Charleroi  
69 — F-ino Saelemakers V. - V. de Costerstraat 45, Leuven  
70 — S-ino Schayes - St-Maartensdal 337, Leuven  
71 — S-ro Dujardin Henri - rue Haute Marexhe, Herstal  
72 — S-ino Dujardin - sama adreso  
73 — F-ino Leibovitch Gloria - Consciencestraat 55, Antwerpen  
74 — F-ino Geelen Agnes - Floralaan 12, Deurne  
75 — F-ino Hauteœur Gerda - Schijfwerpersstraat 25, Antwerpen 2  
76 — S-ro De Kegel - 5, Place des Tramways, Charleroi  
77 — S-ro Castel Hector - 29, Square du Centenaire, Ganshoren  
78 — S-ino Castel Lucy - sama adreso  
79 — S-ro Vandeveld Adhemar - Belgradostraat 29, Gent  
80 — S-ino Lijcke-Vandeveld - sama adreso  
81 — S-ro Van Eynde Jan - Gen. Slingeneyerlaan 1, Deurne  
82 — S-ino Van Eynde - sama adreso  
83 — S-ino Riadis Elisa - Molenstraat 31, Antwerpen  
84 — S-ino Lemmens Mathilde - Van Steenlandstraat 68, Deurne-Zuid

### kaj aŭtoĉaro de la junulargrupo Sint-Kruls

## FIRMA VAN ISEGHEM & VERSTRAETEN

P. V. B. A.

St.-Bernardse steenweg 631  
Hoboken

Vitraloj — Speguloj —	Vitro-cemento por
„securit“ vitro	tutvitra-konstruaĵoj
kolorigitaj vitroj	mastiko
alumintaj senmastikaj	telefono 37.88.20
stangoj por kupoloj	

### Lernu Esperanton en la Muelejoj

Ĉi-somere en la Muelejo de Piot, Francio (kaj en aliaj Muelejoj) denove okazos Esperanto-kursoj. Instruistoj, kiuj deziras fari vojaĝon kun sia klaso, havigi al siaj lernantoj edukan kaj sanigan restadon kaj samtempe instrui al ili Esperanton, povas profiti ĉi tiun eblecon. Generale volonituloj estu pli ol 14-jaraj. Por planado de la kursoj bv. vin anonci frue al H. Bakker, Kastelenstraat 231, Amsterdam-Z, kiu volonte sendos pliajn informojn kaj dokumentojn. (Piot situas ĉe la urbo Châteauroux, oriente de Poitiers.)

## ANTAŬEN . . . MARSŬ !

Oni konas la Militan Procesion de Sankta Rolandino, laŭ kleruloj, ek de la unuaj tempoj de la Mezepoko.

Oni klarigas la ĉeeston de la milico pro la neceseco defendi la relikvojn kaj la religiajn trezorojn, sed ankaŭ por plibeligi la procesiojn.

Komence de la VIII-a jarcento, la reĝo DIDIER, komandanto de la armeoj de la Galioj, havis filinon « ROLANDINO » kies beleco estis konita ĝis la malproksimaj landoj.

La filo de la reĝo de Skotlando, aŭdis pri ŝiaj beleco kaj virtoj, kaj alvenis ĉe DIDIER kun edziĝpropono.

Delonge, Rolandino decidis dedeĉi sian tutan vivon al KRISTO kaj rezigni pri nobeltitoloj kaj reĝaj avantaĝoj.

Por eviti la edziniĝon kun tiu alilanda princo, ŝi decidis foriri kaj rifuĝi en la Monaĥinejo de Kolonjo.

Nokte, ŝi forkuris, helpata de sindona servantino kaj du fidelaj servistoj. Unu, nomita OGER, estis malriĉa paŝtisto tute senruza bonulo, kiu kaŝe ege amis Rolandino'n. Li volis akompani kaj ĉiam protekti ŝin.

Post tagoj kaj noktoj de laciga marŝado, ili trapaŝis GERPINNES, kie la grupo haltis ĉar Rolandino estis tre malsana kaj malfortiĝinta. OGER portis ŝin en domaĉon en VILLERS-POTERIE, kie Rolandino mortiĝanta deziris renkonti pastron.

Blindulo kiu pasis, eniris kaj tuŝis ŝian manon kaj promesis informi la pastron.

Je tiu momento, li konstatis ke li denove perfekte vidis kaj li tuj kuris tion anonci al la Pastro de GERPINNES.

Kiam tiu-ĉi alvenis, kun la tuta vilaĝo informita pri tiu miraklo, Rolandino estis jam morta . . . kaj ĉiuj malsanuloj resaniĝis !

De tiu epoko, la vilaĝo memorfestas tiujn miraklojn (kaj multajn aliajn) per granda procesio kiu altiras ĉiujare je Pentekosto, multajn piulojn kaj kuriozulojn.

Dank'al la buntaj kostumoj, la « militistoj » kiuj akompanas la relikvojn dum la 37 kma irado, konstituas spektaklon imponan kaj entuziasmigantan.

## SEMAJNO EN LA NATURO.

De la 3-a ĝis la 9-a de julio 1967 okazos en la naturrezervejo-konferencio « De Blankaart » en Woumen apud Diksmuide « semajno en la naturo » organizota de la konferencio, en kunlaboro kun la « Ornitologia Rondo Esperantlingva ». Informoj estas haveblaj ĉe « De Blankaart », Ieperse Steenweg 44, Woumen ; aŭ ĉe W. De Smet, Drogenberg 36, Overijsse.

## B.E.F. : kampanjo ĉe la parlamento

La 4-an de marto 1967, reprezentante la Reĝan Esperantistan Bruselan Grupon, mi estis reelektita de la ĝenerala Jarkunsido de BELGA ESPERANTO-FEDERACIO, kiel administranto ; siavice, la administrantaro elektis min kiel estraranon, kies speciala tasko konsistas en la INFORMADO. Aankau mi akceptis dankeme la kunlaboradon de du helpantoj por mia ofico, nome :

Sinjoro HERION Joseph, 36, rue des Raines, Verviers ;  
Sinjoro JACOBS Ghislain, 97, Kerkstraat, Kessel-Lo.

Kun jena kadro, B.E.F. decidis prepari kampanjon ĉe la Parlamento, kiel en aliaj landoj (Italujo, Japanujo, k.c.), por la enkonduko de ESPERANTO en la belgaj lernejoj. Nia unua tasko konsistas el la starigo de listo, kiel eble plej kompleta kaj serioza, de parlamentanoj (deputitoj kaj senatanoj), kiuj favoras Esperanton.

Pro tio, mi afable petas al la ricevant(in)oj de la nuna cirkulero fari enketon en sia medio (grupo - familio - amikaro) kaj komuniki, kiel eble plej baldaŭ, al nia adreso (vidu sube), jenajn informojn :

- 1) nomon kaj antaŭnomon (adreson se eblas) de deputitoj aŭ senatanoj, kiuj ĵamaniere esprimis iam ajn simpatian aŭ aprobon al Esperanto ;
- 2) politikan apartenon kaj funkciojn ĉe la partio, ĉe la parlamento, ĉe iu ajn komisiono, aŭ alle ;
- 3) priskribon pri la maniero laŭ kiu la parlamentanoj esprimis sian favoron al Esperanto (dum konversacio, en letero, artikolo, deklaro, . . .) ;
- 4) nomon de la Esperantist(in)o, kiu havas personan kontakton aŭ konas alirvojon al la koncernataj parlamentanoj.

Kiam nia listo estos preta, B.E.F. intencas uzi ĝin por preparigi projekton de leĝa propono pri instruado de Esperanto en la lernejoj. Vi konstatas ke ĉies kunlaboro estas necesa kaj grava por atingi nian celon ; ĉu ni povas ankaŭ kalkuli pri via kompleze persona helpo ? Mi ne dubas pri tio, kaj afable antaŭdankas vin.

Farmaciisto René JACOBS,  
Prezidanto de Brusela Grupo,  
Estrarano pri Informado,  
94, rue Général Eenens,  
Bruselo 3 - Tel. 15.26.01

## KOMUNIKO

de la

### AKADEMIO de ESPERANTO

Sekcio de la Ĝenerala Vortaro

La Akademio aprobis la ideon de starigo de « Baza Radikaro Oficiala », kies celo estas aparte proponi la vulgaran aŭ lernolibran vortprovizon, tiel ke laŭeble « la vortaro de la lernolibroj fariĝu tute unueca, kaj ĉiu povu certe scii, kian vortkonon oni povas supozi ĉe iu, kiu ĉerpis sian konon sole el lernolibro ».

Tiu baza Radikaro Oficiala estos ellaborita en la venontaj monatoj surbaze de projekto, kiu entenas proksimume 2.500 radikojn kaj elementojn, dividitajn en naŭ grupoj de ofteco : de la unua grupo de plej oftaj elementoj ĝis la naŭa kun relative malpli oftaj radikoj kaj elementoj.

La Prezidanto  
de la Akademio,  
G. WARINGHIEN

La Direktoro de la Sekcio  
pri la Ĝenerala Vortaro,  
Dro A. ALBAULT

# RECENZOJ

Prof. Dr. Kalman Kalocsay : « Vojaĝo inter la Tempoj ». Eldonis STAFETO en La Laguna, Kanariaj Insuloj 1966. 290 paĝoj. Prezo : 2.40 Us. Dol.

Kutime oni legas unue la enkondukon. Ankaŭ nun mi faris tion... kaj ekscis ke estas ankoraŭ verko pri la problemo «ata - ita». Mi nun imagas la koleretan, pri senpacienca atestanta sopron de (multaj) legantoj. Sed dum la legado mi rimarkis ke temas pri multe pli ol nur tiu punkto. Cetero la aŭtoro mem skribas ke la verko, dum verkado, evoluis. Tiel ĝi fariĝis funda gramatika kaj kompargramatika studo, kiu, diverspunkte, povas esti konsiderata kiel plikompletigo de la «Plena Gramatiko» (ankoraŭ!?) (Tiu faktoro kelkaj recenzoj ne priatentis en sia juĝo pri la libro!) Per tio vi jam scias ke tiu publikigaĵo estas destinita al amatoroj kaj kompetentuloj pri lingvistiko. Sed mi esperas ke ĉiuj tiuj aĉetos kaj legos la libron. Ni ja devas pliprofundigi en la kono de nia lingvo. Pli, ekster tio, ni lernos tiom pli pri gramatiko ĝenerale. Oni rapide parolas pri majstroverko; sed tiu libro estas (malgranda) ĉefverko. Ni egalmezure admiras la klaran, metodan menson, la profundecon, la analiz-kaj sintez-kaj vortkreaĵojn kapablon de la aŭtoro kaj ankaŭ lian vastan konon de aliaj lingvoj. Tio ne signifas ke ni akordigas en ĉio kion li tezas.

Multaj inter niaj legantoj scias ke je iu momento ekestis granda disputo inter du partioj pri la ĝusta signifo de la konjugaciaj «estis - ita» kaj «estis - ata»... Aliaj ekokupiĝis pri tio kaj donis sian (ofte nuancitan) ideon kaj eĉ teorion. K. Kalocsay komencas, klarigante tiujn teoriojn, kaj li faras vere klare. Poste li okupiĝas pri la enhavo de la libreto «Esperanto-moderna lingvo» de la triopo Setälä Vilborg kaj Stop-Bowitz (la malgranda libro kun la granda enhavo, sed, fanatikece ne trovebla en la de UEA eldonita «Elektitaj Libro en Esperanto»). Detala preparolado de ĉio kion donas K. Kalocsay ne estus sur sia loko en nia primovada revuo; tio devus havi lokon en «Esperantologio» (kie restas tiu revuo?). Ni nur tre (tro?) koncize skizos la ĉefan aferon. Supozeble vi scias ke laŭ unu de la du partioj, «estis - ata» signifas ke en la (preparolita) estinto, la ago (ankoraŭ) okazis, dum ke «estis - ita» signifas ke en tiu estinto la ago estis jam okazinta aŭ finita (= pluskvamparfecto; la pura tempa signifo de la konjugacio; la logiko mem = tezo de i.a. «Esperanto-Moderna Lingvo»). Laŭ la alia kampo (K. Kalocsay, G. Waringhien, Lapenna, J. Regulo-Perez, Dr. Pump, R. Schwartz k.a.) «estis - ita» signifas ke en tiu (preparolita) estinto la ago okazis ankoraŭ, ĜIS FINITECO; dum ke «estis - ata» signifas ke ĝi okazis kaj ne atingis la finan stadion (= la aspekto de la okazo). Nia opinio; tio kondukas kelkfoje al absurdaĵoj. Ekzemple, se la frazon «antaŭ unu semajno li estis renversata de aŭto» oni devas kompreni tiel ke tiu renversado okazis ree kaj ree kaj ree ĝis kiam(?), tiam la frazo «li estis naskata la 1-1-1230» signifas ke ni ne precize scias kiam li naskiĝis(!). Laŭ nia kompreno, la verboj havas en si mem la finitecon. Oni ne rajtas diri ke io estis vendata se ne okazis unufanke la akcepto de mono kaj aliflanke la akcepto de la varo. Se la verboj ne havas en si mem la evoluon ĝis fino, tiam oni povus diri ekzemple: S-ro X mortis hieraŭ; sed hodiaŭ li, feliĉe, jam fartas pli bone (!). La partio de la «aspektuloj» komprenis tion ankaŭ kaj tial pripensis la enhavon de la verboj. Prof. G. Waringhien venis al la konkludo ke ekzistas tiurilate tri kategorioj de verboj (vidu: G. Waringhien «Lingvo kaj Vivo»; «Plena Gramatiko» 3-a eld. la kajero 1958; kaj o.c. paĝo 27): verboj de daŭro sen rezulto (memori, havi) (aliaj nomas ilin la imperfektivaj verboj); verboj de rezulto sen daŭro (forgesi, kapti, perdi) kaj verboj de daŭro kaj rezulto (lerni, skribi). La du lastaj kategorioj enhavas la verbojn kiuj estas nature perfektivaj. Nun ni daŭrigas la traktaton de K. Kalocsay. Oni ne povas kompreni la verbojn alimaniere ol laŭ la aspekta sistemo. Kial? Ĉar unu de la tempoj fakte ne ekzistas! «La prezenco, kiel tempo, ne ekzistas» diras K. K. (p. 43); «-as» kaj «-estis - ata» ne estas tempoj! Ili estas aspektoj. Efektive ili estas la transiro de la «komenciteco» aŭ de la «nefiniteco» al la «finiteco». Tie-ĉi ni konstataj intermikson de

filozofio kaj filologio. Kelkloke oni havas la impreson legi paĝon el la antikva-Greka filozofio. Nia opinio: ni ne komprenas, se K. K. akceptas tamen iujn prezencojn (paĝo 44, nome la gnomika, la t.n. historia —, la deklara — kaj la prezenco de citado) ni ne komprenas kial li ankaŭ ne akceptas iun prezencon kiun ni nomus psikologia. Li ja devas scii ke ne ĉiu pure teoria rezonado reflektas la realon. Pure teorie oni povas pruvi ke rapidega kuranto neniam povos preterkuri testudon se ĝi eĉ la ekkuro havas antaŭecon eĉ minimuman. Tamen la realo estas alia. Tial ni persistas bedaŭri ke Esperanto ne havas pure tempa pluskvamparfecton. Ja la zamenhofecon kaj fundamentecon de la tezo Waringhien-Kalocsaya oni ne plu povas serioze kontesti. Ankaŭ ke la Slaviaj popoloj komprenas la formon «estis - ata» kaj «estis - ita» alie ol la Germanoj komprenas ilin. Sed restas la (multaj) kazoj kie tia uzo estas vere absurda. Vidu la ekzemplojn donitajn de Teo Jung en «Heroldo» de 1 majo 1961 (jen unu: la nepentrita domo estis pentrita blukolora. Ni dirus en tiu kazo: ... estis pentrata. Sed tiam la «aspektuloj demandus: kaj kiam finpentrita?). Do, kion fari? (Inter krampoj mi devas aldoni ke estas utopio kredi ke de post la apero de tiu libro, ĉiuj estos kapablaj senerare uzi la pasivajn participojn, kiel ŝajnas sugesti la reklamo sur p. 183 de «Esperanto» nov. 1966.) Ĉu la antaŭlasta ĉapitro de la libro montras la vojon kiu kondukos nin al ia solvo?

Mi konscias ke la recenzo donas tre malkompletan bildon de la enhavo de tiu riĉa libro. La oftaj pripensadoj pri formoj, tempoj, vortoj estas tre instruaj. Oni konsciigas ke neniu lingvo estas tiel evoluanta ke ĝi kapablas trovi la ĝustajn esprimojn por ĉiuj situacioj. Ni vidas ke ĉiuj popoloj uzas malĝustajn tempojn, prepoziciojn k.a. kiujn ili tamen ĝuste komprenas. Multaj verboj havas eĉ la diversajn popolojn diversajn signifojn. Sed tiuj popoloj, el la kutima uzo, komprenas kiun situacion ili esprimas. Ili konstituas grandajn malfacilojn en la lernado de fremdaj lingvoj. La ekzemploj kiujn K. K. donas estas trapaj. Esperanto luktas je tiaj malfacilaĵoj. Se studoj, kiel tiu-ĉi, ekzistus ankaŭ en naciaj lingvoj, multaj filologoj kontaktiĝus kun tiu realaĵo ke Esperanto estas interesa lingva

HET WELGEKEUDE  
MAGAZIJN VOOR MODERNE HERENKLEDING



**in't duifken**

GROTE KEUS  
IN GEREDE KLEDING

KOSTUMEN - SPORTJASSEN - BROEKEN  
UNIFORMEN - GABARDINEN - JODENS  
STIJLVOL MAATWERK

KOEPOORTSTRAAT 64-66, ANTWERPEN

RABATO POR ESPERANTISTOJ

fenomeno (diris G. Waringhien) kaj ke ĝi « ne estas artefarita lingvo, sed la plej juna membro de la Hindoeŭropa lingvofamilio » (p. 194). Kiel multaj sciencaj Ruslingvaj verkoj en la antaŭa jarcento restis nekonataj pro nesufiĉa konateco de tiu lingvo, ankaŭ la nesufiĉa konateco de Esperanto faras ke niaj sciencaj verkoj estas ankoraŭ nekonitaj. Tiu nekonateco estas la monto granita kiun fortaj personeoj, kiel ĉi-tiu aŭtoro, estas traborantaj iom post iom. Ni finfine bone konsciiĝu pri tio... kaj ni konatigu niajn lingvon kaj verkojn. Ni ŝuldas multan dankon al aŭtoro kaj al eldoninto pro tiu lingvistike interesega libro.

Drs. F. R.

### Brazilo demandas nian atenton!

La Federacio Esperantista Brazila eldonis grandan historian romanon. Temas pri "Paŭlo kaj Stefano" de Franc. Candido Xavier, majste tradukita de L.C. Porto Carreiro Neto. La 540 paĝa volumo pritraktas la malfacilan komencan periodon de la Kristanismo. Kiel kutime en romano, ne ĉio estas science ĝusta. Kaj estas partoj kiuj povis esti iom malpli longaj. Tiel ĝi similas al niaj historiaj romanoj de la pasinta jarcento. Tamen estas verko kiuj impresas profunde. Tre taŭga por esperantistoj kiuj disponas tempon dum la longaj vintraj vesperoj, kiuj ankoraŭ ŝatas legi, kaj kiujn la televidaparato ne tro katenas.

Iom antaŭe la Kultura Kooperativo de Esperantistoj en Rio de Janeiro estis re-eldoninta, en tre bela vesto kaj aspekto, "Veterano", de alia eminenta esperantisto: Ismael Gomes Braga. Tiu verko konsistis el aro de plej diversaj konsideroj rilatantaj al lingvo, movado ktp. Pro la fakto ke la antaŭa eldono datumas de la jaro 1937, la nuna volumo estas preskaŭ duoble ampleksa kaj havas nun sesdekon da tiaj konsideroj, inter kiuj kelkaj estas eĉ ekster la esperanta tereno, aŭ rilatas al ĝi de tre malproksime. Tamen ili estas tre interesaj kaj inspiraj por nia esperantista agado. Tial tre rekomendinda verko.

Sed nun tiu Kultura Kooperativo (adreso: Avenida 13 de Maio, 47 - SL 208 - ZC-06, Rio de Janeiro, Brazilo) anoncas eldonon kiu laŭ mia opinio, estos la plej grava: nenio malpli ol la Bhagavad - Gita! Jam en 1942 la suprenomita Federacio estis eldoninta parton en la traduko de kompetentulo Francisco Valdomiro Lorenz. Tiu antikv-Hinda skribaĵo estas plena da poezio, kaj plena da saĝeco. Morale ĝi tre proksimas al Kristo; ĝi estas fakte antaŭulo de Kristo. Mi opinias ke same kiel la Biblio, ankaŭ la kompleta Bhagavad-Gita estas nepre havenda libro. Oni ofte parolas pri la ĝeneralhoma eduka valoro de klasikuloj kiel la Grekaj Homero k.a. Kiom (multe) pli tiuj antikvaj Hindaj sanktaj libroj. Ni esperas ke la tradukinto ne estos farinta la samajn du lingvajn erarojn kiel F.V.L. en lia cetera belega traduko, nome kelkfoje la kunligo de adjektivoj kun substantivoj, kaj la uzo de la Ido-sufikso oza.

Malpacience ni atendas la verkon.

---

La recenzitaj libroj estas haveblaj ĉe la librejo „Sonorilo" (Sro Iserentant R.) Kerklaan 61 Brugge. P.K. 152\*40

---

### 11-a IS okazos en Würzburg

La 11-a Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo okazos de 27-12-67 ĝis 3-1-68 en la universitata urbo Würzburg (Main).

La temo estas: Religioj kaj filozofio en la 20-a jarcento.

Tiu seminario estas la dua en la serio de 6 seminarioj sub la ĝenerala temo « Esencaj trajtoj en la hodiaŭa mondo ».

Partoprenintoj de la lastaj IS-oj « aŭtomate » ricevos la Unuan Informilon, supozeble fine de majo. Aliaj interesuloj petu ĝin de GEJ-estrarano H. Behrmann, Volksschule Süd, 4972 Löhne-Obernbeck.

### ANTVERPENO

Esperanto-grupo « La Verda Stelo »

Kunsidoj: Ĉiuendrede en Brasserie « Capitale », Gemeentestraat 15, Antwerpen, je la 20,15-a horo.

Poŝtĉeknumero: 726.54, La Verda Stelo, Deurne.

Dimanĉon, la 15-an de januaro okazis la jubileaj festoj pro la 60-jara ekzistado de la grupo + duobla jubileo de ĝia Prezidanto, S-ro Maur. Jaumotte: 40 jaroj de daŭra prezidanteco kaj 50-jara esperantisteco. Detala raporto pri tio en antaŭa numero de « Sonorilo ».

La 20-an speciale venis el Bruselo la Prez. de la tiea grupo, S-ro R. Jacobs por paroladi pri « Vojaĝo al Varna kaj Istanbul ». La paroloj kaj la kolor-diapozitivaj kompletigis unuj la aliajn kiel vera simfonio kaj forte vekis la deziron tuj vojaĝi al tiuj regionoj por subiri, persone, ĉiujn belajojn pri kiuj la paroladisto raportis kun entuziasmo! Kune kun Prez. Jaumotte oni diras: brave, S-ro Jacobs, revenu baldaŭ kun similaj temoj kaj feinaj diapozitivaj!

La 27-an S-ro R. Balleux, kiel kasisto, kaj S-ro J. Verstraeten, kiel sekretario, raportis respektive pri la kaso kaj la grupa aktiveco en 1966. La Prez. S-ro Jaumotte, aldonis personajn impresojn kaj kompletigis ambaŭ raportojn per saĝaj konsiloj kaj sugestoj.

Dum la 2-a parto de l' vespero S-ro Jo Haazen aŭdigis klasikan muzikon sonorilaran kiun li mem realigis precipe sur la sonorilaro de Hilversum en Nederlando kaj kiun li aŭdigis pere de sonbendo!

La 3-an de februaro S-ro W. De Schutter, direktoro de la redakcio de la antverpena ĵurnalo « De Nieuwe Gazet », iama vigla membro de « La Verda Stelo » kaj diplomito kun « profesora kapableco », donis rimarkindan kaj bone dokumentitan paroladon pri « Israel », lando kiun li vizitis antaŭ 4 monatoj. Oni tuj aŭdis la profesiulon kaj kun vera plezuro la aŭdantaro streĉe aŭskultis la multajn detalojn pri tiu juna kaj dinamika lando en kiu okazos la U.K. de Esperanto dum tiu ĉi jaro. La filmo memverkita — pli precize « familia » filmo — substrekis pli forte ankoraŭ tiel la proble-

## GRUPA VIVADO

mojn kaj malfacilaĵojn kiel la sukceson kaj la rezultojn jam akiritajn de popolo verdire alveninta el ĉiuj regionoj de l' mondo. Por konkludi la paroladisto afable respondis al demandoj.

La 10-an S-ro R. Van Eynde de nove prezentis dokumentajn filmojn Unu estis esperantigita al kies realigo kunlaboris: F-ino Bl. Geers (tradukantino), F-ino A. Geelen kaj S-ro R. Van Humbeeck (paroladistoj), S-ro J. Montmirail (teĥniko). La filmo temis pri la bierfarado en Anglujo; pli precize pri la « Whitbread ».

La 17-an la grupo havis faman gaston: lia Ambasadora Moŝto, S-ro Ralph Harry, ambasadoro de Aŭstralio en Bruselo. Li paroladis pri « Aŭstralio kaj ĝia ĉefurbo Canberra ». Iĝis grandioza vespero: multe da publiko, multaj nekutimaj vizitoj, agrabla sfero kaj bonhumora Prezidanto!

Post mallonga enkonduko S-ro R. Harry prezentis 2 filmojn, Esperante parolatajn, en belaj koloroj: unu pri Aŭstralio antaŭ 10 jaroj, la alia freŝdata. Pere de ili oni bone povis rimarki la progreson faritan...

Post la prezentado la ambasadoro estis preta respondi al demandoj de la publiko. Tiuj estis plej diversaj: pri la strukturo de la lando, la instruado, la rasaj problemoj, la libertempaj okupoj, le enmigrado, la sociaj leĝoj.

La 24-an denove iĝis sukcesplena, surpriza programo; S-ro Jo Haazen, unu el la junaj, verdstelanaj elementoj, organizis muzikan vesperon helpe de siaj gelnantoj kiuj ludis diversajn instrumentojn. Pluraj gepatroj aŭ familianoj de la gelnantoj ĉeestis.

Jo Haazen klopodis akiri iom da « standing ». La forsendado de invitkartoj (presitaj) al la ĝenerala publiko, programoj, k.t.p. efektive kreis « iom solenan sferon kiu agrable impresigas ».

La 3-an de marto la Vic-prez. S-ro H. de Roover, paroladis pri la « Hoge Veluwe » (Nederlando). Pri tiu belega natur-rezervejo li montris samtempe admirindajn kolor-diapozitivojn. Precipe tiu regiono estas kara al S-ro de Roover ĉar li tie naskiĝis kaj travivis la unuajn jarojn de sia juneco.

La 10-an S-ro F. Herman organizis « Turisman Kvizon » pri Malnova Antverpeno. La kunlaborado de la ĉeestantoj estis plen-atenta ĉar la organizanto donacis belan libron enhavante valorajn ilustraĵojn pri « Antverpenaj malnovaj Pordegoj ». S-ro Herman plene sukcesis interesi la publikon kiu multnombro partoprenis al la ludo konsistanta el 22 demandoj kombinitaj kun kordiapozitivoj kiujn S-ro Fr. De Roover speciale kaj tiucele verkis! S-ro E. Paesmans gajnis la premion. Brave S-ro Herman! Kompletige al tiu programo S-ro Fr. De Roover aŭdigis folkloran muzikon kaj polkantadon de Wannes Van de Velde, tipa antverpena kantisto nunmomenta!

Sabaton, la 11-an, dum komitata kunveno nova estraro estis kunmetata jene: Prezidanto: S-ro Maur. Jaumotte; Vic-prezidantoj: S-roj Ivo Durwael kaj H. de Roover; Sekretario: S-ro J. Verstraeten; Help-sekretario: S-ro R. Van Humbeeck; Kasisto: S-ro R. Balleux; Festestrino: F-ino A. Geelen; Tehniko: S-roj J. Montmirail kaj R. Van Eynde; Butiko: S-ino Nath. Balleux; membroj: S-roj F. Schellekens, E. Paesmans kaj Jo Haazen.

La 17-an S-ro R. Van Eynde organizis la jam tradician dokumentan filmvesperon kaj zorgis ke unu filmo estis en Esperanto. Temis pri Kanado. Kunlaboris: krom S-ro R. Van Eynde mem (kiu ankaŭ tradukis la tekston), S-ro R. Van Humbeeck (paroladisto) kaj S-ro J. Montmirail (tehnikisto).

La 24-an staris en la signo de la Sankta Vendredo. La nova festestrino, F-ino A. Geelen, kune kun Ges-roj R. Balleux, agrable surprizigis la envenantojn per la speciala paska ornamado de la salono: paskaj leporoj, ovoj, sonoriloj... ili estis samtempe la premioj por lotumado kiu donis neatenditan financon sukceson! Brave nova festes-

LES ENTREPRISES

**DERKS**

226, Rogierstrato, BRUSELO 3

Tel. : 16.89.92 Entrepreno de

KONSTRŬAJOJ

trino! Kune kun Ges-roj Balleux, kompreneble!

Alia surprizo estis la propono de S-ro L. De Doncker por krei paskan sferon pere de muziko kaj diapozitivoj. Iĝis ne nur ensorĉiga programo sed vere tute arta programo, — fabelo por okuloj kaj oreloj! S-ro De Doncker montris — diapozitive — la alvenontan printempon pere de la plej diversaj floroj kaj natur-belaĵoj kiuj ekzistas! El arta vidpunkto sendube estas sentoplana nomo kies koro kaj animo elradias la amon por la naturo kaj konsekvence ankaŭ por la homoj!

#### HONORIGO:

Kun plezuro ni eksciis pri la honorigo de nia Vic-prez., S-ro H. de Roover, per la burĝa medalo unuaklasa pro lia 25-jara deĵorado en la instruado!

Ni kore gratulas la honorigiton kune kun la familianoj kaj deziras al li daŭran kaj fruktodonan laboron en la fako al kiu li vere dediĉis kun daŭro amo siajn plej valorajn fortojn!!

#### L.E.R. LOVENO

Depost longa tempo ni ne plu sciigis ion pri nia aktiveco. Tamen ni ne ĝuis dolĉan (vintran) dormadon. Sangiĝoj en la estraro: S-ino Meurrens tenas nun la martelon(!); S-ro De Saeytjijd fariĝis vicprezidanto; F-ino Saelemaekers respondecas pri la trezorego (!); F-ino Henquinez helpas la aliajn en la diversaj taskoj; kaj S-ro G. Jacobs plenigas la paperojn. Nepre ni nun plifortigu, ne nur je nombro (ni estas ± 30 gemembroj kaj gesimpatiantoj) sed ĉefe je kvalito nian rondon. Ekzistas junulargrupo. Dum la venonta monato, ni aranĝos propagandan butikon en la granda magazeno « Gal. Anspach ».

#### « PACO KAJ JUSTECO » BRUGGE

La redakcio severe admonas nin pri spacomanko en la nuna numero de « Sonorilo ». Do, ni menciis nur la plej gravan kunvenon kiun ni havis en la lasta periodo. Jaŭdon la 20-an de aprilo venis al nia grupo, lia ambasadoro moŝto Ralph Harry. Iom pli ol 50 gesamideanoj ĉestis la paroladon, la montradon de du filmoj kaj la respondadon al multaj demandoj. Ni salutis delegacion de la alia Bruĝa grupo, de la grupo de Blankenberge, kaj multnombro de la junulargrupo. Ĝi iĝis tre bela kaj tre instrua vespero. Poste la ambasadoro moŝto interkonatiĝis ankoraŭ kun estraro de « Paco kaj Justeco » en la hejmo de ĝia prezidanto. **Junulargrupo de « Paco kaj Justeco ».**

Krom la supre menciita kunveno, ni devas menciiti la specialan kunve-

non kiun ni havis la unuan de majo en la « Hejmo De Grave ». La temo estis: interrilatoj inter gejunuloj. Post enkonduka parolado de S-ro F. Roose, sekvis unua ideinterŝanĝo sub gvidado de S-ino Roose. Poste oni interrompis por kafo kaj sandviĉoj, kaj iom da dancado. La mallona vetero ne permesis ludon ekstere, bedaŭrinde. Poste okazis rea debato, en kiu kelkaj povis foje tute libere kaj tute sincere diri tion kio kuĝis « sur sia stomako ». Tiaj purigadoj ideale bonigas la atmosferon en grupo; kaj estas nepre bezonaj. La kunveno kiu estis planita ĝis la sesa horo, daŭris ĝis la sepa kaj duono. Tuj esprimiĝis la deziro por ankoraŭ tia posttagmezo. Jes, S-ino kaj fraŭlino Roose havis multe da laboro kaj prizorgado ili faris tion « con amore »; kaj ni tre tre dankas ilin.

## FONDAĴO M. Jaumotte-Loquet

### FONDAĴO por la Disvastigo de la Informado pri ESPERANTO

Transpreno	117.441 F
Ges. Van Eynde - Neefs	1.000 F
	<hr/>
	118.441 F

Kun danko.



**Ensendojn por la  
maja-junia numero  
ni petas antaŭ la  
20.5.1967**



manufakturaĵo firma DE BROUWERE

Magdalenastraat 29 Kortrijk (Belgujo) - Tel. (056) 216 54



## **VIRINAJ BLUZOJ** **" MAGDELEINE "**

deponita kvalitmarko  
por la eleganta sinjorino  
la perfekta konfekcio  
fabrikita el plej  
at kvalitaj teksaĵoj

Haveblaj en la bonaj  
konfekcibutikoj

### **PRECIPAJ CENTROJ:**

Antwerpen	: Aalmoezenierstr. 2 Anselmostr. 17 Nationalestr. 87 Leysstraat 10
Arlon	: 12 Marché-aux-Légumes
Brugge	: Breidelstr. 8
Brussel	: Anspachlaan 194 Oude Kleerkoperstr. 31
Gent	: Brabantdam 21
Herstal	: 4 Rue Large Vote
Leuven	: Bondgenotenlaan 13
La Louvière	: 16 rue Albert 1er
Luxembourg	: 67 Place de la Gare
Mechelen	: IJzeren Leen 32
Oostende	: Kapelstraat 23
Roeselare	: Oostr. 124
Tournai	: 75 Rue Royale
Turnhout	: Herentalstr. 6
Verviers	: 2 Pont St. Laurent
Wetteren	: Jos. Buyssestr. 39-a